# Kreado k evoluado de l' vivaĵoj

La natursciencistoj komparas inter si ĉiujn formojn de la vivo, k la homo estas nur unu el ili. Kelkaj eĉ kontraŭstaras al tio konsenti al la homo privilegian intereson. Sed ĉiuj estas streĉe okupitaj nur pri li, same multe tiuj, kiuj lin devenigas de iu tipo de malsupera ekzisto kiel tiuj, kiuj por restarigi lian dignon, pretendas, ke li estis objekto de speciala kreado. Ĉiuj metas lin al la pinto de l'animalaro, ĉu por montri, ke li resumas ĝin, ĉu por montri, ke li ĝin superas. La granda publiko interesiĝas pri la teorioj de l'evoluado nur pro la solvoj, kiujn ili alportas rilate la lokon de l'homo en la naturo, rilate lian originon k lian destinon.

La 19-a jarcento estis tiu de l'transformismo: ĝi akceptigis tiun ideon, kiu aperis konfirmita per paleontologio k embriologio, — ke la vivo produktas unue simplajn formojn, kiuj komplikiĝas laŭgrade, k kies ludo de naturaj faktoroj sufiĉas por klarigi la manieron de variado k ankaŭ la regulon de l'vica sinsekvado. Tiu ĉi formulo multe kontentigis la spiriton, ĉar ĝi ŝajnis identigi la historian parencecon de l'estaĵoj kun ilia logika parenceco.

Ĝi aperas hodiaŭ tro skema k nekapabla klarigi ĉiujn faktojn. Ĝi estis multe kritikata en la sekvo, en diversaj verkoj menciataj en la esperantlingva **„La Nuna Stato de l'Evoluismo"**, de J. Rostand, (jusa eldono de SAT).

Iam oni kontraŭstarigis radikale la evoluadon al la kreado: ĉi lasta estis alvoko al la ekzisto pere de supernatura potenco monda, k la mondo mem estis ĝia verko. La evoluado estis la laŭgrada disvolviĝo, laŭ interna principo, de mondo, kiu estis kvazaŭ el-oviĝo. Sed jam tiuj du konceptoj ne estis sen interrilatoj, ĉar la kreado devis cedi lokon al la evoluado por permesi al ĉiu vivaĵo, inter naskiĝo k morto, formi sian propran naturon; aliflanke la evoluado similis al vica sinsekvado de partaj kreoj, laŭgrade kiel ĉiu ekzistoformo aldonis ioman pluson al la antaŭirinta. Rezignante je rekono de aktiva krea rolo de iu dio en la mondkreado, oni povus atribui al li ian pli malpli pasivan partoprenon, per povo permesanta al ĉio, kio ekzistas, la eblon mem kreiĝi k disvolviĝi. La vorto pri evoluo sufiĉas por esprimi la ideon pri naturo, kiu estas samtempe kreata k kreanta. Se la kreado estas ĉie, estas neutile ĝin alvoki por klarigi en la mondo apartan efikon.

Nu, eĉ se la kreado estus ordonita afero — per kio oni tre simple klarigus la originon de l'vivo — tio ne sendevigus la homojn serĉi pri rilatoj inter la diversaj kreitaj estaĵoj. Aliflanke la teorio pri evoluado devas serĉi la solvon de l'problemo en la nun ekzistantaj palpeblaj faktoj: la materio k la diversaj ŝtupoj de l'vivo ja kunekzistas antaŭ ni. La karakterizo de l'aktuala epoko estas la klopodo transporti en la nuntempon la malnovan problemon pri la originoj. La malkovro pri la relativeco de l'tempo povas helpi en tio. Iuj malnovaj klarigoj de l'nuno per la pasinto trafos diskreditiĝon. Dekart jam asertis, ke la ago, per kiu dio konservas la universon en ĉiu momento, estas la sama kiel tiu, per kiu li ĝin kreis la unuan fojon. Se oni akceptus lian hipotezon, malaperus ĉiu angoro pri la **unua horo** de l'mondo, kiu estus esence tute simila al ĉiu horo de nia propra vivo.

Se vin interesas tiuj problemoj, havigu al vi la verkon de J. Rostand, kies tradukon SAT eldonis sub titolo „La Nuna Stato de l'Evoluismo" (114 paĝoj, prezo: kartonita eldono 0,70, bandita 0,85 dol. us. plus 10% por la afranko).



## Junulara angulo

**„El mia tuta koro"**

La bedaŭrindaj faktoj, notitaj sub tiu ĉi titolo en la maja n-ro, pri dogmiĝo de politika teorio, instigis min konigi al la reveluciema junularo poemon de la fama rusa poeto, unuaranga en la periodo sekvanta la Revolucion de 1917, intertempe ĉesiginta sian vivon per sinmortigo,-**Majakovski.** Mi provis traduki tiujn versojn esperanten k esperas, ke ili spegulas sufiĉe fidele la originalon.


*Ĉu ankaŭ pri Lenin validu:*
*De Dio elektit' nin gvidu?*
*Se li kiel princ' kaj di' kondutus,*
*Mi ja plenĉagrene kontraŭstarus,*
*Torĉajn procesiojn spit-disputus,*
*Al la laŭdkantantoj vojon barus.*
*Timas mi, ke radianta krono,*
*Aŭreol' la simple blankan kapon*
*Kaŝu, malnobliga ĉi propono*
*Donu al gigantkrani' Lenina frapon.*
*Ke neniam pilgrimad', incens', tombego,*
*Konvenci-omaĝ', formal-konstruo,*
*Kiel Tedeum' miela superregu*
*Justan koron de Lenin per balzamfluo!*

*A. Ramŝak.*

**Tendloko apud Parizo**

SAT-anoj, kiuj jam vizitis Parizon, spertis kiom malfacile estas trovi taŭgan tendterenon proksime de tiu urbo. Nu, k-do Chance el Reims malkovris tian terenon je 15 km de Parizo k je 10 km norde de Versajlo, en eksfortikaĵo, 600 m for de **Noisy-le Roi;** ĝi nomiĝas „La Jungle" (la ĝangalo). Posedanto estas s-ro Lehault. Oni pagas iomete, sed regas vera komforto; ventŝirmitaj terenoj por tendumi, ŝirmejoj por bicikloj, dormejoj por netendemuloj, tualetlavejoj, necesejoj, nutrajvendejo ktp. Petu prospektojn al sro Lehault kun informoj kiel atingi la lokon, en okazo de serioza intenco utiligi la terenon.

Adr.: Lehault, „La Jungle", **Noisy-le-Roi,** S. & O., Francio.



## LIBERPENSULA ANGULO

Sub tiu ĉi rubriko ni aperigis en la januara n-o artikolon „La kvina k sesa taĉmentoj", verkita de k-do Ariadno. Neniu respondis al la eldiroj k asertoj faritaj en ĝi, malfavoraj al la t.n. humanistoj — skolo ekzistanta jam de pluraj jarcentoj (Erasmo) k postmilite sufiĉe vaste disvastiĝinta en Nederlando. Sed en la centra organo de l' nederlanda Humanismo „Homo k Mondo" **(Mens en Wereld),** n-o 4, aprilo 1951, aperis artikolo sub titolo „Kalumnia sensencaĵo", preciziganta, ke la asertoj de k-do Ariadno ne baziĝas sur vero, k ke tia publikigo damaĝas la reputacion de SAT. Cetere la gazeto „La Liberpensulo" (De Vrijdenker), organo de la liberpensula organizo, ekzistanta jam dum pli ol 80 jaroj, siavice protestis ankaŭ kontraŭ la diroj de Ariadno.

Ni rimarkigas al tio, ke ni neniam ricevis pozitivan materialon pri la nederlanda Humanismo, sekve ne havis eblon prijuĝi la valoron de la diroj de k-do A., pri kiuj li mem portas la plenan respondecon. Tiu respondeco estas eĉ duoble pli grava, tial ke Ariadno prenis sur sin la taskon sekretarii por la Liberpensula Frakcio k redakti ĉi tiun rubrikon (taskon, je kiu li intertempe rezignis, ĉar ni ne kontentigis liajn postulojn pri publikigo de multo sendita de li).

Ni bedaŭras, ke k-do Ariadno en sia inklino al ekscesa parolmaniero citis nekredindaĵojn; ni bedaŭras ankaŭ ke tiuj akuzoj aperis sen tuja rebato fare de membroj, kiuj vidis la erarojn.

Estas jam malfacile por redaktoro kontroli la laŭverecon de raportitaj faktoj okazantaj proksime, tiom pli malfacile, eĉ neeble, kontroli la veron pri okazaĵoj malproksimaj. Kaj niaj kunlaborantoj ja loĝas en la plej diversaj zonoj.

*P.K. de SAT k redaktoro de S-ulo.*

**Klariga noto:** La Humanismo kiel doktrino naskiĝis en Eŭropo sekve de la Renesanco, fine de la mez-epoko. Eminentaj reprezentantoj estis i.a. Erasmo en Nederlando k Tomas More en Britio. La Humanista Ligo en Nederlando, stariĝinta post la dua mondmilito, disiĝe de la Liberpensula Movado, estas malpli antireligia ol ĉi lasta, tamen liberpensa, kun etika fundamento, ekster-eklezia. La Humanista Ligo k la Liberpensula organizo multfoje harmonie kunlaboras.

1000 gejapanoj deziras korespondi, aŭ interŝanĝi PM, PK, aŭ gazeton kun tuta mondo, garantias respondon.
Adresu al *Esp. Koresponda Grupo,* 260, Oka-Shinmachi, Hirakata-city, *Osaka,* Japanio.

Sekretario de progresema filmamanta organizo deziras korespondi pri filmo, teatraĵo, muziko; interŝanĝi materialojn, fotojn, gazetojn ktp. Adresu: *Eiga Saakuru,* ĉe Sanbetu-kaikan, Minamikaziya-tyo, Naka-ku, *Nagoja,* Japanio.

S-ro JOYEUX Robert, HURIEL, Allier, Francio, 39-jara, apotekisto, serĉas ĉiulandajn gekorespondantojn, pri literaturo, kino, arto, moroj ktp.